

LA SENMORTULO

Rakonto de

JOAQUIM MARIA MACHADO DE ASSIS

Esperantigis: Josenilton kaj Madragoa

UNUA ĈAPITRO

- Mia patro naskiĝis en 1600...

- Pardonon, sed vi volis diri "en 1800", kompreneble.

- Ne, sinjoro, - replikis D-ro Leono, serioze kaj malĝoje; - estis ja en 1600.

Miregis la aŭdantoj, kiuj estis du, nome Kolonelo Bertiogo kaj Johano Linjaro, la notario de la vilaĝo, kiu situis en la rio-de-ĵanejria provinco, supozeble en Itaboraio aŭ Sapukajo. Pri la dato de tiu interparolo, mi havas nenian dubon, ke ĝi okazis en la jaro 1855, en novembra nokto malluma kia peĉo, varma kia forno, post la naŭa. Ĉio silentemis ĉirkaŭe. La loko, kie ili tri sidis, estis la verando rigardanta al la korto. Subtilluma lampiono, pendigita per najlo, reliefigis la eksteran mallumon. De tempo al tempo ĝemis seka kaj akra vento, kiu sin miksis kun la monotona sono de proksima akvofalo. Tiaj estis la sceno kaj momento, kiam D-ro Leono insistis pri la unuaj vortoj de la rakonto.

- Ne, sinjoro; li naskiĝis en 1600.

Homeopatia medicinisto, - la homeopatio estis ekeniranta en la landojn de nia civilizacio, - tiu D-ro Leono alvenis al la vilaĝo dek aŭ dek du tagojn antaŭe, provizita per bonaj rekomendleteroj, jen personaj, jen politikaj. Li estis saĝa, tre ĝentila kaj bonkora viro. La vilaĝanoj rimarkis ian malĝojon en lia mieno, ian timidecon en liaj

kutimoj kaj eĉ ian aŭ ian alian sekecon en liaj vortoj, malgraŭ lia perfekta ĝentileco; tamen ĉio tio estis atribuata al la hontemo dum la unuaj tagoj kaj al la resopiroj pri la Kortego. Li aĝis tridek jarojn kaj havis iometon da kalvo, malbrilan rigardon kaj episkopecajn manojn¹. Li estis disvastiganta la novan sansistemon.

La du aŭskultantoj daŭre miregis. La dubon esprimis la dommastro, Kolonelo Bertiogo, kaj la notario ankoraŭ insistis pri la afero, montrante al la medicinisto, ke estas neeble, ke lia patro naskiĝis en 1600. Ducent kvindek kvin jarojn antaŭe! Du jarcentojn kaj duono! Estis neeble. Do, se tiel, kiomjaraĝa li estis? Kaj kun kiom da jaroj mortis lia patro?

- Mi ne havas intereson rakonti al vi pri la vivo de mia patro, - respondis D-ro Leono. - Oni parolis al mi pri maljunegulo, kiu loĝas malantaŭ la ĉefpreĝejo. Tiam mi diris al ili, ke rilate al la afero de maljuneguloj, mi konis ion plej mirindan en la mondo, nome senmortan viron...

- Sed ĉu via patro ne mortis? - demandis la kolonelo.

- Jes, li mortis.

- Do li ne estis senmorta, - konkludis triumfe la notario. - Senmorta oni diras pri homo, kiu ne mortas, sed via patro mortis.

- Ĉu vi volas de nun priaŭskulti min?

¹ Senkalaj, nelaboristaj, delikataj manoj, laŭ antikva brazila metaforo.

- Nu, povas esti, - respondis la kolonelo iom ŝancelite. – Plej bone estas aŭskulti vian historion. Mi nur diru al vi, ke iun pli grandaĝan ol la aludita loka laborestro, mi neniam vidis. Li vere estas tro maljunega. Ankaŭ via patro certe estis tro maljuna...?

- Li estis tiel juna kiel mi. Sed por kio vi faras tiajn antaŭdemandetojn? Certe por miregi pli kaj pli, ĉar en vero la historio pri mia patro ne estas facile kredinda. Mi povas rakonti ĝin en malmultaj minutoj.

Ekscitinte ilian scivolemon, li ne malfacile silentigis ilin. La familio jam estis en la dormoĉambro, la tri estis solaj en la verando, kaj D-ro Leono fine rakontis pri la vivo de sia patro, per la vortoj, kiujn vi, leganto, vidos, se vi klopodos por legi la duan kaj la ceterajn ĉapitrojn.

DUA ĈAPITRO

- Mia patro naskiĝis en 1600, en la urbo Recife².

Kiam li aĝis dudek kvin jarojn, li enordeniĝis kiel franciskano, pro deziro de mia avino, kiu estis profunde religiema. Kaj ŝi kaj ŝia edzo estis bondevenaj homoj, - "bonsangaj", kiel diradis mia patro, imitante antikvan dirmanieron.

Mia avo devenis el la hispana nobelaro, kaj mia avino estis el granda domo en Alentejo. Ili geedziĝis ankoraŭ en Eŭropo, kaj jarojn poste, pro

² Ĉefurbo de la ŝtato Pernambuko, en Brazilo.

kialoj, kies sciigo ne estas ĉi tie oportuna, ili transloĝiĝis al Brazilo, kie ili restis kaj mortis. Mia patro diradis, ke malmultajn virinojn li konis tiel belajn kiel mia avino. Kaj bone notu al vi, ke li amis la plej belegajn virinojn en la mondo. Sed ni ne anticipu la faktojn.

Li surmetis sur sin la frakon en la monaĥejo de Igũarasuo, kie li restis ĝis 1639, la jaro kiam la nederlandanoj plian fojon atakis la vilaĝeton. La monaĥoj forkuris de la konvento, sed mia patro, pli malfruema ol la aliaj (aŭ jam kun la intenco abdiki la monaĥecon), restis en la ĉelo, tiamaniere, ke la nederlandanoj trovis lin, en la momento kiam li kolektis kelkajn religiajn librojn kaj personajn objektojn. La nederlandanoj ne traktis lin malbone. Li regalis ilin per la plej bona franciskana manĝaĵejo, kie la malriĉeco estas la regulo. Ĉar estis kutimo, ke tiuj fratoj alterne servadis en la kuirejo, mia patro spertis pri la kulinara arto, kaj tiu talento en vero estis sorĉaĵo ĉe la alveno de la malamiko.

Fine de la dua semajno la nederlanda oficiro proponis al li paspermesilon, por ke li foriru tra kie ajn li volus; sed mia patro ne akceptis ĝin tuje. Unue li pripensis, ĉu li devis resti kun la nederlandanoj kaj, en ilia ombro, forlasi la Ordenon, aŭ ĉu estis pli bone, ke li serĉu vivon per si mem. Li preferis la duan solvon, ne nur tial, ke li havis aventureman, scivoleman kaj kuraĝan spiriton, sed ankaŭ ĉar li estis patrioto kaj ankaŭ bona katoliko, malgraŭ lia malemo al la monaĥa vivo, kaj pro tio li ne volis miksiĝi kun la herezaj invadintoj. Li akceptis la paspermeson kaj forlasis Igũarasuon.

Li ne memoris, kiam li rakontis al mi tiujn okazaĵojn; li ne plu memoris pri la nombro da tagoj, kiujn li pasigis sola tra dezertaj lokoj, intence fuĝante de la vilaĝeto, sed ankaŭ ne volante iri al Olindo³ nek al Recifo, kie estis la nederlandanoj. Manĝinte la provianton, kiun li portis, li ekdependis de sovaĝaj ĉasaĵoj kaj fruktoj. Efektive li forlasis la ordenan vivstilon; li vestiĝis per flandrastila pantalono, kiun oficiro donis al li, kaj per bluzo aŭ ledjako. Resumante, li atingis vilaĝon de indiĝenoj, kiuj akceptis lin tre bone, per grandaj karesaĵoj kaj favoraĵoj. Mia patro estis eble la plej plaĉaspekta el la viroj. La indiĝenoj estis ravitaj de li, precipe la ĉefo, iu maljuna, brava kaj bonkora batalanto, kiu eĉ donis al li sian filinon kiel edzinon. Tiam mia avino jam estis mortinta, kaj mia avo, elpatrujigita al Nederlando, laŭ sciigo, kiun mia patro ekhavis laŭ okazo, de iama servisto de la domo. Li restis, do, en tiu indiĝena vilaĝo ĝis 1642, jaro dum kiu mortis la iama ĉefbatalanto. Tiu okazaĵo pri lia morto estas vere mirinda. Mi petas vian plej grandan atenton.

La kolonelo kaj la notario streĉis la orelojn, dum D-ro Leono kviete pinĉ-prenis tabakon kaj snufis ĝin, malrapide kiel iu, kiu trompete rifuzas anonci ion intereseĝan.

TRIA ĈAPITRO

Iun nokton la indiĝena ĉefo, - li nomiĝis Piraĵuaŭo, - venis ĉe la hamakon de mia patro, por anonci sian morton iom post la sunleviĝo, kaj petis, ke mia patro pretiĝu por akompani lin foren

³ Pernambuka urbo apud Recifo.

antaŭ la lasta momento. Mia patro ege maltrankviliĝis, ne pro tio, ke li kredis al li, sed pro tio, ke li supozis lin deliranta. Dum la frumateno, la bopatro revenis al li.

- Ni foriru, - li diris al li.

- Ne, nun ne: vi estas malvigla, tre malvigla...

- Ni foriru! – ripetis la batalanto.

Ĉe la lumo de estingiĝanta brul-lignaro, mia patro ekvidis ordonan esprimon sur lia vizaĝo, krom ia diableca mieno ĉiel eksterordinara, ke li teruriĝis. Li stariĝis kaj akompanis lin en la direkto al rivereto. Atinginte la rivereton, ili marŝis laŭ ties maldekstra bordo, supren, dum tempo, kiun mia patro kalkulis, ke ĝi daŭris kvaronhoron. La frumateno pliheliĝis. La luno forfuĝis ĉe la unuaj sinanoncoj de la suno. Tamen, malgraŭ la internlanda vivo, kiun mia patro havis de kelka tempo, tiu aventuro timigis lin. Li sekvis gvatante la bopatron, timante ian perfidaĵon. Piraĵuao marŝis silente, fiksrigardante la grundon, kun la frunto plena je pensoj, kiuj povis esti kruelaj aŭ nur malĝojaj. Kaj ili marŝis, marŝis, ĝis Piraĵuao diris:

- Tie ĉi.

Ili staris antaŭ tri ŝtonoj triangule aranĝitaj. Piraĵuao sidiĝis sur unu; mia patro, sur alia. Post kelkaj minutoj da ripozo:

- Deloku tiun ŝtonon, - diris la batalanto, almontrante la trian, kiu estis la plej granda.

Mia patro stariĝis kaj iris al la ŝtonego. Ĝi estis tre peza kaj rezistis al la unua puŝo; sed mia patro insistis, streĉante ĉiujn siajn fortojn, kaj la ŝtono cedis iomete, poste iom pli, kaj finfine ĝi estis delokita.

- Fosu la teron, - diris la batalanto.

Mia patro ĉirkaŭserĉis kaj trovis spliton el ligno aŭ bambupecon, mi ne bone scias, kaj komencis fosi la grundon. Tiam li jam estis scivola vidi, kio enteniĝis tie. Ideo naskiĝis en li, - pri iu enfosita trezoro, kiun la batalanto, timinte morti, volas doni al li. Li fosis, fosis, fosis, ĝis li ektuŝis malmolan objekton; ĝi estis kruda argilvazo, eble cindrouro. Li ne eltiris ĝin kaj eĉ ne forskuis la teron de ĉirkaŭ ĝi. La batalanto alproksimiĝis, malligis la pecon da tapirledo, kiu kovris ĝian buŝon, enmetis la brakon kaj eltiris poton. Tiu poto havis la buŝon kovritan per alia ledopeco.

- Venu tien ĉi, - diris la batalanto.

Ili ree sidiĝis. La batalanto tenis la poton sur la genuoj, kovrita, mistera, ekscitante la scivolemon de mia patro, kiu ardis de la deziro scii, kio estis tie interne.

- Pirajuao mortos, - li diris; - li mortos por ĉiam. Pirajuao amas vin, Blankan Batalanton, la edzon de Marakuĵaa, lian filinon; kaj liveros al li tute unikan sekreton.

Mia patro estis tremanta. La batalanto malrapide malligis la ledajon, kiu kovris la poton. Malkovrinte, li rigardis internen, stariĝis kaj venis

montri ĝian enhavon al mia patro. Ĝi estis flaveta likvaĵo kun akra kaj singularaodoro.

- Kiu trinkos el tio, unu solan gluton, neniam plu mortos.

- Ho! Trinku, trinku! – vive ekkriis mia patro.

Tio estis ama impulso, nepripensita sentaĵo de vera fila amikeco, kion nur en posta momento mia patro ekkomprenis, ke li ne havas, ĉar li ekkredis pri tiu sciigo, kiun lia bopatro donis al li, kaj ne pri la parolo de la bopatro mem, kies prudenton li supozis afekciita de la malsano. Piraĵuao sentis la spontanecon de tiu parolo de mia patro kaj dankis pri ili, sed tamen li kapneis.

- Ne, - li diris; - Piraĵuao ne trinkos. Piraĵuao volas morti. Li estas laca; li vidis multajn lunojn, multajn lunojn. Piraĵuao volas ripozi sub la grundo; li estas enuinta. Tamen Piraĵuao volas postlasi tiun ĉi sekretaĵon al Blanka Batalanto. Ĝi estas tie ĉi. Ĝi estis preparita de fora, tre fora maljuna sorĉ-kuracisto... Kiam Blanka Batalanto trinkos el ĝi, tiam li ne plu mortos.

Dirinte tion, li rekovris la buŝon de la poto kaj metis tiun ĉi denove en la argilvazon. Mia patro tiam fermis la buŝon de la sama argilvazo kaj remetis la ŝtonon sur ĝin. La unua suna eklumo jam montriĝis. Ili rapide revenis hejmen. Eĉ antaŭ ol kuŝiĝi en la hamako, Piraĵuao mortis.

Mia patro ne kredis la efikon de la eliksiro. Estus absurde supozati, ke iu tia likvaĵo povas fari escepton al la leĝo de la morto. Kompreneble ĝi estis nur ia kuracilo, se ĝi eĉ ne estis veneno; en

tia okazo, la fantazio de la indiĝeno estus tuj klarigita, pro la menskonfuziĝo, kiun mia patro atribuis al li. Tamen, malgraŭ ĉio, li malkaŝis nenion pri tio al la ceteraj indiĝenoj de la vilaĝo, eĉ ne al sia propra edzino. Li silentis. Li neniam sciigis al mi la kialon de tiu lia silento; mi kredas, ke ĝi ŝuldiĝis al nenio pli ol la influo de la mistero mem.

Kelkan tempon poste, li malsaniĝis, tiel grave, ke li estis konsiderata baldaŭ mortonta. La tiea sorĉ-kuracisto anoncis al Marakuĵaa, ke ŝi vidviniĝos. Mia patro ne aŭdis tiun sciigon, sed legis ĝin en paĝo da larmoj sur la vizaĝo de la kunsortulino, kaj sentis en si mem, ke lia vivo finiĝas. Li estis forta, brava, kapabla alfronti ĉiajn danĝerojn. Li ne teruriĝis, do, pro la ideo morti. Li adiaŭis la vivantojn, faris kelkajn rekomendojn kaj pretigis sin por la granda transvojiro.

Malfrue en la nokto li ekmemoris la eliksiron, kaj tiam demandis al si mem, ĉu ne estas ĝuste provi ĝin. Jam tiam la morto estis nedubebla, do kion li povus perdi pro tiu provo? La scienco de unu jarcento ne scias ĉion; alia jarcento venos kaj renovigos ĉion. Kiu scias? – li pensis en sia koro - eble la homoj eltrovos iam la senmortecon, kaj eble la scienca eliksiro tiam estos tiu ĉi sama praarbara drogo. Kiu la unua kuracis el la maligna febro, tiu faris mirindaĵon. Ĉio estas nekredebla, antaŭ ol esti diskonigita. Kaj, rezoninte tiele, li decidis alkonduki sin al la loko de la ŝtono, ĉe la bordo de la rojo; sed li ne volis iri dum la tago, timante esti malkaŝita. Nokte, li levis sin kaj iris, malfacile paŝanta, ŝanceliĝanta, tremanta de frosto. Li alvenis al la ŝtono, delokis ĝin, eltiris la poton kaj trinkis la duonon de ties enhavaĵo.

Poste li sidiĝis por ripozi. Aŭ la ripozo aŭ la kuracilo tuj reanimis lin. Li regardis la poton. Post duonhoru li kuŝis denove en la hamako. En la sekvanta mateno li estis sana...

- Ĉu tute sana? – demandis la notario João Linhares, interrompante la rakontanton.

- Tute.

- Temis pri kuracilo por febro...

- Ĝuste tion li ekkredis, kiam li revidis sin sana. Ĝi ja estis kuracilo por febro kaj aliaj malsanoj; kaj nenio pli pensiĝis pri tio. Tamen pasis la jaroj, sed mia patro ne maljuniĝis; kia li aspektis en la tempo de la malsano, tia li restis. Neniu haŭtsuketo, neniu blanka haro. Juna, ĉiame juna. La vivo en la arbaro komencis enuigi lin. Li estis restinta tie pro danko al la bopatro, sed la resopiroj pri la civilizacio ekprenis lin. Iun tagon la vilaĝo estis invadita de hordo da alivilaĝaj indiĝenoj, oni ne scias kial, sed la kaŭzo ne gravas al nia raporto. En la batalo multaj pereis; mia patro estis vundita kaj forfuĝis en la herbaron. La sekvantan tagon li revenis al la vilaĝo kaj trovis la edzinon mortinta. Liaj vundoj estis profundaj; li kuracis ilin per ordinaraj kuraciloj; kaj li resaniĝis post malmultaj tagoj. Tamen tiuj sukcesoj plifirmigis lian intencon forlasi la duonsovaĝan vivon kaj reiri al la civilizita kaj kristana vivo. Multaj jaroj estis pasintaj post lia forfuĝo el la monaĥejo de Igũarasuo; neniu plu rekonis lin. Iun tagon matene li lasis la vilaĝon, sub la preteksto iri ĉasi; unue li iris al la rivereto, apud kio li delokis la ŝtonon, malfermis la argilvazon kaj eltiris la poton, en kiu li estis lasinta la

restaĵon de la eliksiro. Lia ideo estis analizigi la drogon en Eŭropo aŭ eĉ en Olindo, Recife aŭ Bahio, de iu fakulo pri kemiaĵoj kaj farmacio. Samtempe li ne povis flanke lasi senton de danko; li ŝuldis al tiu kuracilo sian sanon. Havante kun si la poton, la junecon en la kruroj kaj la decidemon en la brusto, li foriris de tie, survoje al Olindo kaj al la eterneco.

KVARA ĈAPITRO

– Mi ne povas droni en detaloj, - diris D-ro Leono, akceptante la kafon, kiun la kolonelo ordonis alporti. – Estas preskaŭ la deka horo...

- Kaj kio el tio? – demandis la kolonelo. – la nokto estas je nia dispono; krome, konsiderante la malmulton, kiun ni faros morgaŭ, ni povos ekdormi kiam ajn ni volos. Mi miavice ne havas dormemon. Kaj vi, S-ro João Linhares?

- Ne eĉ iometon, - respondis la notario.

Kaj li insistis ĉe D-ro Leono, ke li rakontu ĉion. Li aldonis, ke li neniam aŭdis ion tiel eksterordinaran. Notindis, ke la notario supozis sin klera pri malnovaj historioj, kaj li estis konsiderata en la vilaĝo kiel unu el la homoj plej instruitaj en la Imperio; malgraŭ tio, li estis miregigita. Tiam li mem rakontis, dum la kafumado, pri Metuŝelaĥo, kiu estis vivinta naŭcent sesdek naŭ jarojn, kaj pri Lemeĥ, kiu mortis je la aĝo de sepcent sepdek sep; sed tamen li tuj klarigis (ĉar li estis sendependmensulo), ke tiuj kaj aliaj ekzemploj de la hebrea kronologio ne havas scienca fundamenton...

- Nu! Ni sciu nun, kio okazis al via patro, - interrompis la kolonelo.

La vento, pro troa laciĝo, mortis; kaj la pluvo komencis rulbrui sur la folioj de la arboj, unue intermite, poste kontinue kaj abunde. La nokto malvarmiĝis iomete. D-ro Leono daŭrigis la rakonton, kaj, kvankam li diris, ke li ne povas profundigi en detalojn, li rakontis ilin tiel plenzorge, ke mi tute ne ekpensas meti ilin sur tiujn ĉi paĝojn; estus tre enuige. Plej bone estas fari resumon.

Rui de Leono, aŭ pli komplete, Rui Garcia de Meireles e Castro Azevedo de Leono, laŭ kio nomiĝis la patro de la kuracisto, mallongtempe restis en la ŝtato Pernambuko. Unu jaron poste, en 1654, ĉesis la nederlanda regado. Rui de Leono atestis la ĝojojn pri la venko kaj transloĝiĝis al la regno, kie li edziĝis al nobla sinjorino el Lisbono. Li naskigis filon; kaj li perdis kaj la filon kaj la edzinon en la sama monato marto 1661. La doloro, kiun li tiam suferis, estis profunda; por distri sin li vizitis Francujon kaj Nederlandon. Sed en Nederlando, aŭ pro motivo de kelkaj sekretaj amoj, aŭ pro la malamo de kelkaj judoj naskdevenaj aŭ el Portugalujo, kun kiuj li komerce interrilatis en Hago, aŭ eĉ pro aliaj nekonataj motivoj, Rui de Leono ne povis vivi trankvile dum longa tempo; li estis arestita kaj kondukita al Germanujo, de kie li transiris al Hungarujo, al kelkaj italaj urboj, al Francujo kaj fine al Anglujo. En Anglujo li profunde studis la anglan; kaj, ĉar li sciis la latinan, kiun li lernis en la konvento, la hebran, kiun instruis al li en Hago la fama Spinozo, de kiu li estis amiko, kaj kiu eble motivigis la malamon de la aliaj judoj al li; - la

francan, la italan kaj iom de la germana kaj de la hungara, li fariĝis en Londono aĵo el granda scivolo kaj respekto. Li estis serĉata, konsultata, aŭskultata, ne nur de vulgaruloj kaj idiotoj, sed ankaŭ de instruituloj, politikistoj kaj korteganoj.

Konvenas diri, ke en ĉiuj landoj, kie li estadis, li plenumadis plej diversajn oficojn, kiaj: soldato, advokato, sakristiano, danco-instruisto, komercisto kaj libro-vendisto. Li estis eĉ sekreta agento en Aŭstrujo, pontifiko-gardisto kaj ŝipekipisto. Li estis agema kaj inĝenia, sed ne tre persistema, se juĝi laŭ la varieco de la aferoj, kiujn li entreprenis; li, tamen, diris, ke ne, ke la sorto ĉiam estis malfavora al li. En Londono, kie ni vidas lin nun, li limiĝis al la metio de literaturisto kaj nenionfaranto; sed ne longe daŭris, kaj li revenis al Hago, kie atendis lin kelkaj iamaj amoj, ne malmultaj ĵusaj.

La amo, estas necese diri, estis unu el la kaŭzoj de la malkvieta kaj turbulenta vivo de nia heroo. Li estis aparte eleganta kaj plaĉaspekta, dotita de rigardo plena de forto kaj magio. Laŭ li mem diris al la filo, li tre multe superis la donjuanan nombron *mille e tre*. Li ne sukcesis kalkuli la ĝustan nombron de la virinoj, kiujn li amis en ĉiuj latitudoj kaj lingvoj, ekde la necivilizita Marakuĵaa el Pernambuko ĝis la bela kipranino aŭ la nobelino el la salonoj de Parizo kaj Londono; sed li kalkulis ne malpli ol kvin mil virinoj. Facile supozeblas, ke tia granda aro da homoj devis enhavi ĉiajn eblajn specojn de ina beleco: blondajn, brunajn, palajn, ruĝajn, altajn, mezaltajn, malaltajn, maldikajn aŭ dikajn, tre pasiajn aŭ langvorajn, ambiciemajn, pi-afektajn,

voluptemajn, poeziemajn, inteligentajn, stultajn; - jes, ankaŭ la stultajn, kaj estis opinio lia, ke la stulteco de la virinoj havas inan sekson kaj estas gracia, kontraŭe al tiu de la viroj, kiu apartenas al la virseksa malmildeco.

- Estas okazoj, - li diris, - en kiuj stulta virino havas sian lokon.

En Hago, inter la novaj amoj, elstariĝis unu, kiu katenis lin dum longa tempo. Ŝi estis S-ino Emma Sterling, grandsinjorino angla aŭ, pli bone dirite, skota, ĉar ŝi devenis el dublina familio. Ŝi estis bela, decidema kaj aŭdaca: - tiel aŭdaca, ke ŝi eĉ proponis al la amato ekspedicion al Pernambuko, por konkeri tiun kolonian teritorivididaĵon kaj akلامي sin la reĝoj de la nova ŝtato. Ŝi havis multan monon kaj povis havigi multe pli. Ŝi eĉ sonde pridemandis kelkajn ŝip-posedantojn kaj komercistojn, krom iamaj militistoj, kiuj vivis arde esperante repagojn. Rui de Leono teruriĝis ĉe la propono de la amantino kaj kredis ĝin; sed S-ino Emma insistis kaj montris sin tiel rokece, ke li rekonis finfine, ke li estas antaŭ vera ambiciulino. Tamen li estis prudenta homo; li perceptis, ke tiu entrepreno, kiel ajn bone elpensita ĝi estis, estos nenio pli ol fiaska ekprovo. Li diris tion al ŝi; li elmontris, ke, se la tuta Nederlando forrezignis pri tio, ne estus facile al privatulo alveni tien kaj sukcesi sekuran regadon, des malpli rapidan. S-ino Emma rezignis la planon, sed ne malhavis la ideon altigi lin al granda rango.

- Vi estos reĝo aŭ duko...

- Aŭ kardinalo, - li aldonis ridante.

- Kial ne kardinalo?

S-ino Emma faris, ke Rui de Leono baldaŭ eniĝu en la konspiracion, kiu rezultigis la invadon al Anglujo, la civilan militon kaj fine la morton de la ĉefaj gvidintoj de la ribelo. Tiu ĉi estis sufokita, sed S-ino Emma ne kapitulacis. Tiam venis al ŝi en la kapon miregiga ideo. Rui de Leono similis al la patro de la duko de Monmouth mem, la supozata natura filo de Karlo la Dua kaj la ĉefa gvidanto de la ribelintoj. Vere estas, ke ambaŭ estis tre similaj inter si, same kiel du akvogutoj. Alia vero estis, ke, dum okazis la civila milito, S-ino Emma elpensis la sekretan planon, fari ke la duko estos mortigita, se li estos venkinta, kaj ke li kaŝe estos anstataŭigita per ŝia amanto, kiu, tial, sidiĝos sur la trono de Anglujo. Ne necesas diri, ke la pernambukano ne eksciis pri tia krima mallojalaĵo, nek ke li ne konsentus pri ĝi. Li eniĝis en la ribeladon, atestis ĝian pereon per sango kaj en la mortpuno, kaj rapidis kaŝi sin. Emma akompanis lin; kaj, ĉar la espero pri la scepro ne pereis en ŝia koro, post kelka tempo ŝi dissciigis, ke la duko ne mortis, sed jes amiko tre simila al li kaj tre sindonema, kiu anstataŭis lin ĉe la mortpuno.

- La duko estas vivanta, kaj baldaŭ li reaperos al la nobla popolo de Britujo, - ŝi flustris dise en la orelojn.

Kiam Rui de Leono efektive aperis, la mirego estis granda, la entuziasmo reviviĝis, la amo reanimis la idealon, kiun la ekzekutisto estis supozinta fini en la Turo de Londono. Monkontribuoj, donacaĵoj, armiloj, defendiloj, ĉio

venis al la manoj de la aŭdaca pernambukano, aklamita reĝo kaj tuj ĉirkaŭita de grupo da viregoj pretaj morti por la sama idealo.

- Mia filo, - diris li, post unu kaj duono da jarcento, al la homeopata kuracisto, - vi preskaŭ estus naskiĝinta princo de Kimrujo... Mi regis urbojn kaj vilaĝojn, publikigis leĝojn, nomumis ministrojn kaj, eĉ tiele, rezistis al du aŭ tri militistaj ribeloj, kiuj trudpetis la falon de la du lastaj kabinetoj. Mi pensas, ke la internaj malakordoj favoris la leĝan forton, kaj mi ŝuldas al ili mian malvenkon. Finfine mi ne koleris pri ili. Vere la batalo lacigis min. Mi ne mensogas, dirante, ke la tago de mia aresto estis por mi ripoziga. Mi estis atestinta, krom la unua, du civilajn militojn, unu interne de la dua, unu kruelan, la alian, ridindan, ambaŭ sensencajn. Aliflanke mi jam estis vivinta multe, kaj ĉar ili ne ekzekutus min, mi volis, ke ili lasu min malliberigita aŭ ekzilita en la foran randon de la Tero, kaj mi petus nenion pli al la homoj, almenaŭ dum kelkaj jarcentoj... Mi estis malliberigita, juĝita kaj kondamnita al morto. El miaj kunlaborantoj ne malmultaj malkonfesis ĉion; mi kredas eĉ, ke unu el la ĉefaj mortis en la Ĉambro de la Lordoj. Tiel granda sendankeco estis ekturmentiĝo. Tamen Emma, ne; tiu nobla sinjorino ne forlasis min; ŝi estis malliberigita, kondamnita kaj pardonita; sed ŝi ne forlasis min. En la antaŭtago de mia ekzekuto, ŝi venis al mi, kaj ni pasigis kune la lastajn horojn. Mi petis, ke ŝi ne forgesu min; mi donis al ŝi unu harligon; mi petis al ŝi pardoni la senkapigiston... Emma eksplodis per plorsingultoj. La gardistoj venis elĉeligi ŝin. Restinte sola, mi resume rememoris mian vivon, ekde Igŭarasuo ĝis la Turo de

Londono. Tiam ni estis en 1686; mi estis okdek-sesjara, ne ŝajnante pli ol kvardekjara. Mia ŝajno estis tiu de eterna juneco; sed tamen la ekzekutisto estis detruonta ĝin post nelonge. Ne valoris la penon esti trinkinta la duonon de la eliksiro kaj esti gardinta la misteran poton, sed morti tragike sur la trunk-stumpo de eŝafodo... Tiaj estis miaj pensoj en tiu nokto. En la mateno mi prepariĝis por la morto. Venis la pastro, venis la soldatoj kaj ankaŭ la ekzekutisto. Mi obeis meĥanike. Ni ĉiuj alpaŝis, mi supreniris la eŝafodon kaj ne faris lastan parolon. Mi klinis la kolon sur la stumpon, kaj tiam la ekzekutisto faligis la armilon. Mi sentis penetrantan doloron, premegan angoron, kvazaŭ okazis subita korhalto; sed tamen tiu sento estis tiel granda kiel rapida; en la sekvanta momento mi revenis al la normala stato. Restis sango sur mia kolo, sed malmulta kaj preskaŭ seka. La ekzekutisto repaŝis; la popolo kriegis, ke oni mortigu min; oni reklinis mian kapon, kaj la ekzekutisto, streĉinte ĉiujn siajn muskolojn kaj principojn, donis alian mortobaton, ankoraŭ pli fortan, kapablan, se estus eble, samtempe fosegi mian tombon, laŭ oni jam diris antaŭe pri iu bravulo. Mi spertis senton similan al la unua, laŭ intenseco kaj rapideco; mi relevis la kapon. Nek la juĝisto nek la pastro permesis unu plian baton. La popolo emociiĝis; unuj nomis min sanktulo, aliaj, diablo, kaj tiuj ambaŭ opinioj estis poste defendataj en la drinkejoj, per forto de pugno kaj brando. Jen kiel diablo, jen kiel sanktulo, mi estis kondukita al la kuracistoj de la Kortego. Ili aŭskultis la deklarojn de la juĝisto, la pastro, la ekzekutisto kaj kelkaj soldatoj, kaj konkludis, ke post la dono de ĉiu mortobato, la histoj de la kolo rapide ligiĝis denove, same kiel pri la ostoj; kaj ili ne klarigis

tian fenomenon. Mi miavice, anstataŭ rakonti la aferon pri la eliksiro, prisilentis; mi preferis ĝui la avantaĝojn de la mistero. Jes, mia filo; vi ne povas imagi, kiel impresiĝis la tuta Anglujo; mi ricevis amleteretojn de la plej elegantaj dukinoj, krom versoj, floroj, donacoj, metaforoj... Iu poeto nomis min Anteo; juna protestanto elmontris al mi, ke mi estas la Kristo mem.

KVINA ĈAPITRO

La rakontanto daŭrigis:

- Vi jam rimarkas, laŭ tio, kion mi rakontis, ke mi ne finus hodiaŭ, nek en tiu ĉi tuta semajno, se mi volus priskribi detale la tutan vivon de mia patro. Iun tagon mi faros tion, sed skribe, kaj mi pensas, ke la verko plenigos kvin volumojn, krom la dokumentoj...

- Kiujn dokumentojn? – demandis la notario.

- La multajn pruvajn dokumentojn, kiujn mi posedas: bilojn, leterojn, kopiojn de verdiktoj kaj de aktoj, kopiojn de statistikaĵoj... Ekzemple, mi havas la raporton de popolnombrado pri iu kvartalo de Ĝenovo, kie mia patro mortis en 1742; ĝi entenas lian nomon, kun informo pri la loko, kie li naskiĝis...

- Kaj ankaŭ kun lia vera aĝo? – demandis la kolonelo.

- Ne. Laŭaspekte mia patro estis ĉiam aĝanta inter kvardek kaj kvindek jaroj. Apenaŭ li ekŝajnis havi kvindek aŭ kvindek kaj kelkajn jarojn, li tuj retroaĝis; - kaj estis al li facile fari tion, ĉar li ne

restadis sufiĉe longe en iu sama loko; li vivis kvin, ok, dek, dek du jarojn en iu urbo kaj transloĝiĝis al alia... Prie mi havas multajn dokumentojn, kiujn mi montros, inter ili la testamenton de S-ino Emma, kiu mortis mallonge post la malsukcesinta ekzekuto de mia patro. Mia patro diradis al mi, ke inter la multaj resopiroj, kiujn la vivo estis lasanta al li, tiu pri S-ino Emma estis el la plej fortaj kaj profundaj. Li neniam konis virinon pli subliman, nek amon pli konstantan, nek sindediĉon pli blindan. Kaj la morto konfirmis la vivon, ĉar la heredanto de S-ino Emma estis mia patro. Bedaŭrinde la heredo havis aliajn postulantojn, kaj tial la testamento estis implikita en proceson. Mia patro, ne rajtante loĝi en Anglujo, akceptis la proponon de amiko ĝustatempe veninta al Lisbono, por averti lin, ke ĉio estis perdita, ke maksimume li povus heredeti nur tre malmultan parton, kaj tial li proponis al li pagi por tiu duba rajto ĉirkaŭ dek mil kruzadojn. Mia patro akceptis ilin. Tamen li estis tiel malbonŝanca, ke la testamento estis rajtigue aprobita, kaj la heredo fordoniĝis al la manoj de la aĉetinto...

- Kaj tial via patro fariĝis malriĉa...

- Kun la dek mil kaj kelkaj kruzadoj, kiujn li arigis. Li ekhavis tiam la ideon eniri en la negocon pri sklavoj; li havigis al si la licencon, ekipis ŝipon kaj transportis afrikanojn al Brazilo. Tio estis la parto de lia vivo, kiu plej multe kostis al li; sed poste li alkutimiĝis al la severaj devoj de sklavoŝipo. Li alkutimiĝis, sed ankaŭ tediĝis, kio estis alia ripetaĵo en lia vivo. Li enuiĝis pri la oficoj. Krome, la longedaŭraj solecoj sur la maro plivastigis lian intiman malplenecon. Iun tagon li pripensis kaj demandis al si mem, ĉu li tiel

kutimiĝos al la navigado, ke li devos trairi sur la oceano por la jarcentoj de jarcentoj. Li timiĝis; kaj tiam li ekkomprenis, ke la plej bona maniero trairi la eternecon, estas variigi ĝin...

- En kiu jaro li estis tiam?

- En 1694; fine de 1694.

- Mirinde! Li aĝis tiam naŭdek kvar jarojn, ĉu ne? Kompreneble, junule...

- Tiel junule, ke li edziĝis du jarojn poste, en la ŝtato Bahio, kun bela sinjorino, kiu...

- Diru.

- Jes, mi diros; ĉar li mem rakontis al mi la historion. Kun sinjorino, kiu amis alian. Kaj kian alian! Kredu, ke mia patro, en 1695, eniĝis en la konkerbatalon de la fama respubliko Palmareso. Li kunluktis kontraŭ bravulo kaj perdis amikon, intiman amikon, traboritan per kugloj, nudan...

- Nudan?

- Estas vere; la negroj defendis sin ankaŭ per bolanta akvo, kaj tiu amiko estis trafita de plena poto da ĝi; li fariĝis tuta ulceraĵo. Mia patro rakontis tiun epizodon kun dolorsento kaj eĉ kun konsciencia riproĉo, ĉar dum la lukto, li akcidente piedpremis la kompatindan kunulon; ŝajnis eĉ, ke li mortis tiam, kiam mia patro frapis al li la vizaĝon per la botoj...

La notario faris eksuferan grimacon, kaj la kolonelo, por kaŝi sian teruriĝon, demandis,

kion komunan havis la konkero de Palmareso kun la virino, kiu...

- Ĉion komunan, - daŭris la medicinisto. Mia patro, samtempe kiam li vidis la amikon morti, savis la vivon al oficiro, ricevante mem sagpafon en sian bruston. Okazis jene. Unu el la negroj, vundfaliginte du soldatojn, fleksis la pafarkon direkte al persono de la oficiro, kiu estis brava kaj simpatia junulo, orfo je patro, lasinta la patrinon en Olindo... Mia patro rezonis, ke la sago ne pereigos lin, kaj tial, per unu salto, li sin metis inter ili. La pafo vundis al li la bruston; li falis. La oficiro, Damiano... Nu, nur Damiano. Mi ne diru lian tutan nomon, ĉar li havas kelkajn posteulojn sur la teroj de Minas-Ĝerajso. Nur Damiano sufiĉas. Damiano pasigis la nokton apud la lito de mia patro, dankema, flegema, laŭdanta lin pro tiel nobla faro. Kaj li ploris. Li ne povis elteni la penson, vidi morti la homon, kiu savis al li la vivon per tiel rara maniero. Mia patro resaniĝis rapide, miregigante ĉiujn. La suferinta patrino de la oficiro volis kisi al li la manojn. "- Sufiĉos al mi la jenan premion:" – diris li; "vian amikecon kaj tiun de via filo". Tiu okazintaĵo miregigis la tutan Olindon. Oni parolis pri neniu alia afero; kaj post kelkaj semajnoj la publika admirado zorgis krei legendon. La sinofero, laŭ vi scias, estis nenia, ĉar mia patro ne povis morti; sed la popolo, kiu ne scis tion, elpensis kaŭzon al tiu sinofero, kaŭzon tiel grandan kiel li, kaj ĝi eltrovis, ke Daniano devis esti filo de mia patro, kaj kompreneble eladulta filo. Oni enketis pri la pasinteco de la vidvino kaj eĉ trovis kelkajn kaŝitaĵojn ŝiajn perditajn en la nekonateco. La vizaĝtraĵto de mia patro ekestis rekonata de

kelkaj; iu eĉ asertis, ke, irinte al manĝeto dudek jarojn antaŭe ĉe la vidvino, kiu tiam ankoraŭ estis edzino, li vidis tie mian patron. Ĉiuj tiuj kalumnioj tiel ĉagrenis mian patron, ke li decidis transloĝiĝi al Bahio, kie li edziĝis...

- Ĉu kun tiu alia sinjorino...?

- Ĝuste. Li edziĝis al S-ino Helena, bela kiel la suno, li diris. Post unu jaro mortis en Olindo la vidvino, kaj tiam Damiano venis al Bahio, por alporti al mia patro har-faskon de sia patrino, krom kolĉeno, kiun la agoniintino petis esti uzata de lia edzino. S-ino Helena eksciis la epizodon pri la sago kaj dankis pri la memoraĵo de la mortintino. Damiano volis reveni al Olindo; mia patro petis al li, ke ne, ke li iru en la posta jaro. Damiano restis. Tri monatojn poste okazis inter li kaj S-ino Helena malbonmora pasio. Mia patro eksciis, de vizitademulo de la domo, pri la perfidaĵo de ili ambaŭ. Li volegis mortigi ilin; sed tiu sama, kiu denunciis ilin, avertis ilin pri la danĝero, kaj tial ili povis eviti la morton. Mia patro turnis ponardon kontraŭ si kaj enmetegis ĝin en la koron.

“Filo”, - li diris, rakontante la epizodon; “mi ponardpikegis min ses fojojn, kaj ĉiu el ili sufiĉis por mortigi homon, sed mi ne mortis.” Freneziĝinte, li eliris el la hejmo kaj enĵetiĝis en la maron. La maro redonis lin al la tero. La morto ne povis akcepti lin: li apartenis al la vivo por ĉiuj jarcentoj. Li havis neniun alian solvon, ol fuĝi; li venis al la Sudo, kie kelkajn jarojn poste, en la komenco de la pasinta jarcento, li troveblis en la elfosado de la minoj. Tio estis lia maniero dronigi la afliktiĝon, kiu

estis granda, ĉar li multe amis la edzinon, tre malsaĝe...

- Kaj ŝi?

- Estus longaj rakontoj, kaj ne restas al mi sufiĉa tempo. Ŝi venis al Rio-de-Ĵanejro, post la du francaj invadoj, kredeble en 1713. Tiam mia patro jam estis riĉiĝinta pro la minoj kaj loĝis en la rio-de-ĵanejria urbo, estimata, eĉ kun la penso esti nomumita guberniestro. S-ino Helena aperis al li, akompanate de la patrino kaj de iu onklo. La patrino kaj la onklo venis, por diri al li, ke estis jam tempo fini la situacion, en kiun li enpuŝis la virinon. La kalumnio pezis longe sur la vivo de la kompatinda sinjorino. Ŝiaj haroj estis blankiĝantaj, ne nur pro la maljuneco, kiu estis alvenanta, sed ankaŭ pro la malfeliĉaĵoj, pro la larmoj. Ili montris al li leteron subskribitan de la denunciinta vizitemulo, petanta pardonon al S-ino Helena pri la kalumnio, kiun li elirigis kontraŭ ŝi, kaj konfesanta, ke li tion faris movite de krima pasio. Mia patro estis bonanima homo; li enakceptis la virinon, la bopatrino kaj la onklon. La jaroj plenumis sian oficon; ĉiuj ili maljuniĝis, escepte de mia patro. Helena fariĝis tute blankhara; la patrino kaj la onklo rapidis al la kadukeco; kaj neniu el ili deturnis la okulojn de mia patro, gvatante la blankajn harojn, kiuj ne elaperis al li, krom liaj neĉeestantaj faltoj. Iun tagon mia patro subaŭskultis ilin diri, ke li havas rilatojn kun la diablo. "Tiel vigla!" Kaj aldonis la onklo: "Por kio taŭgos la testamento, se ni mortos la unuaj?" Du semajnojn poste mortis la onklo; la

bopatrino malsaĝiĝis post unu jaro. Restis la virino, kiu vivdaŭris nur mallonge poste.

- Kio ŝajnas al mi, - sugestis la kolonelo, - estas, ke ili venis spurante la monkuprerojn...

- Plej certe.

- ... kaj ke tiu S-ino Helena (Dio pardonu ŝin!) ne estis tiel senkulpa, kiel ŝi diris. Estas vere, ke la letero de la denunciinto...

- La denunciinto estis pagita por skribi la leteron, - klarigis D-ro Leono; mia patro eksciis pri tio post la morto de la edzino, transloĝiĝinte al Bahio... Nu, estas la noktomezo! Ni iru endormiĝi; estas malfrue; morgaŭ mi rakontos la ceteron.

- Ne, ne, rakontu ĝin tuj.

- Sed... sinjoroj... Kondiĉe ke nur supraĵe.

- Povas esti supraĵe.

La doktoro stariĝis kaj iris rigardi la nokton, etendante la brakon eksteren, tial ke li ricevis kelkajn gutojn da pluvo sur la manon. Poste li revenis kaj ekvidis la du rigardantaj demande unu la duan. Li malrapide faris cigaredon, ekbruligis ĝin kaj, post fumelĵeti ĉirkaŭ tri fojojn, li ekfinis la kuriozan historion.

SESA ĈAPITRO

— Mia patro, mallonge poste, forlasis Brazilon, iris Lisbonon, kaj el tie li pasis al

Hindujo, kie li restis pli ol kvin jarojn kaj el kie, kun kelkaj skribstudaĵoj faritaj pri tiu parto de la mondo, li revenis al Portugalujo. Fajlinte la materialon lastan fojon, li prespublikigis ĝin, tiel oportune, ke la registaro kunvokis lin, por nomumi lin la guberniestro de Goao. Unu antaŭa kandidato al la posteno, apenaŭ sciinte pri la afero, kontraŭentreprenis ĉiajn eblajn kaj neeblajn rimedojn. Patronaĵoj, intrigoj, klaĉaĵoj, ĉio servis al li kiel armilon. Li eĉ sukcesis, per mono, ke unu el la plej bonaj latinistoj en la duoninsulo, iu senskrupula viro, forĝu latinan tekston el la verko de mia patro kaj atribuu ĝin al aŭgustenisma monaĥo mortinta en Adeno. La kosto de plagiato malakceptigis mian patron, kiu ne prenis la regadon de Goao, kiu transdoniĝis al la manoj de la alia; kaj li perdis, des pli malbone, la tutan personan ŝatatecon. Li skribis longan sinpravigon, sendis leterojn al Hindujo, kies respondojn li ne atendis, ĉar dum tiuj faroj, li tiel ĉagreniĝis, ke li opiniis pli bone forlasi ĉion kaj foriri el Lisbono. Tiu ĉi generacio forpasos, - li pensis, sed mi postvivos. Mi revenos tien ĉi post unu aŭ du jarcentoj.

- Miru tion, - interrompis la notario, - tio ŝajnas ŝercaĵo! Reveni post unu jarcento aŭ du, kvazaŭ estus post unu aŭ du monatoj. Kion vi priopinias, sinjoro kolonelo?

- Ha! Mi volus esti tia viro! Kompreneble li ne revenis unu jarcenton poste... aŭ ĉu li revenis?

- Atentu min. Li foriris el tie al Madrido, kie li amorrilatiĝis kun du nobelulinoj. Unu estis

vidvino kaj bela kiel la suno; la alia estis edzinigita kaj malpli bela, sed amema kaj milda kiel turto. La edzo de tiu ĉi lasta malkaŝis la konkubecon, sed ne volis alfronti mian patron, pro ties ĉi nenobelego. Tamen la pasio pro la ĵaluzo kaj honordigno gvidis la ofenditon al la faro de perfidaĵo samgrava kiel la alia: li ordonis mortigi mian patron; la algvaziloj donis al li tri ponardpikojn kaj dek kvin tagojn da kuŝa malsano. Kiam li restariĝis, oni ĵetis pafon al li; tio efikis nenion. Sekve de tio, la edzo trovis manieron elimini mian patron; li estis vidinta lin kun kelkaj objektoj, skribaĵoj kaj desegnaĵoj pri religiaj aferoj el Hindujo, kaj tial li denunciis lin al la Sankta Ofico, kiel sindonanton al superstiĉaj praktikoj. La Sankta Ofico, kiu ne estis preterlasema nek neglektema pri siaj devoj, enkaptis lin kaj kondamnis lin al la eterna enkarcereco. Mia patro tute teruriĝis. Vere estis, ke la eterna karcerpuno por li devis esti la afero plej terura en la mondo. Prometeo, Prometeo mem estis malkatenita... Ne interrompu min, S-ro Linjaro; poste mi diros al vi, kiu estis tiu Prometeo. Sed, mi ripetas: li estis malkatenita, dum mia patro estis en la manoj de la Sankta Ofico, sen espero. De alia flanko, li konsideris, ke, se li estas eterna, ne tia estas la Sankta Ofico. "La Sankta Ofico certe iam havos finon, kune kun ties karceroj, kaj tiam mi iĝos libera". Poste li ekpensis ankaŭ, ke, kiam li estos pasiginta certan nombron da jaroj, nek maljuniĝinte, nek mortinte, li fariĝos fenomeno tiel eksterordinara, ke la Sankta Ofico mem malfermos al li la pordojn. Fine li cedis al alia konsidero: "Mia filo, - li diris al mi, - mi estis antaŭe tiel suferinta dum ĉiuj longaj jaroj de

mia vivo, mi jam estis vidinta tiom da malicaj pasioj, tiom da mizero, tiom da malfeliĉaĵoj, ke mi dankis al Dio pro la karcero kaj la longedaŭra mallibereco; kaj mi diris al mi, ke la Sankta Ofico ne estis tiel malbona, ĉar ĝi lasis min, dum kelkdeko da jaroj, eble dum jarcento, for de la ekstera spektaklo...”

- Nu, Nu!

- Kompatindulo! Li ne elkalkulis kun la alia nobelulino, la vidvino, kiu uzis ĉiajn rimedojn laŭ sia povo, kaj sukcesigis lian fuĝon post kelkaj monatoj. Ili ambaŭ eliris el Hispanujo, eniris en Francujon kaj pasis al Italujo, kie mia patro restis vivanta dum multaj jaroj. La vidvino mortis en liaj brakoj, kaj escepte pri nobela junulo, kun kiu ŝi fuĝis kaj restis ses monatojn, ŝi ĉiam estis fidela al la amanto. Mi ripetas, ŝi mortis en liaj brakoj, kaj li multe suferis, multe ploris; li eĉ volis morti ankaŭ. Li priskribis al mi la agojn el malespero, al kiuj li pelis sin. Vere estas, ke li amegis la belan madridaninon. Konsternite, li survojis kaj vojaĝis tra Hungarujo, Dalmatujo, Valaĥio; li vivis kvin jarojn en Konstantinopolo, studis profunde la turkan kaj poste la araban. Mi jam estis dirinta al vi, ke li regis multajn lingvojn; li memorigadis min vidi lin reciti la patro-nian en kvindek malsamajn idiomojn. Li sciis multon. Kaj sciencojn! Mia patro sciis multege da aferoj: filozofio, jurisprudenco, teologio, arkeologio, ĥemio, fiziko, matematikoj, astronomio, botaniko. Krome li sciis pri arkitekturo, pentrarto, muziko... Li ja sciis tro multe.

- En vero...

- Multe, li sciis multe. Kaj li faris pli, ol studi la turkan; li adoptis Mahometanisman. Tamen li rezignis pri ĝi post nelonge. Fine li ĝenis sin pri la turkoj: lia sorto estis enuiĝi facile pri ia ajn afero aŭ ofico. Li foriris el Konstantinopolo, vizitis aliajn partojn de Eŭropo kaj fine pasis al Anglujo, kien li ne iris de antaŭ multaj jaroj. Tie ripetiĝis tio, kio okazis al li ĉie: li trovis vizaĝojn tute aliajn; kaj tiu alterno de vizaĝoj en sama urbo forlasita de li antaŭe donis al li la impreson de teatro-prezento, en kiu la scenejo ne varias, sed la aktoraro alternas. Tiu impresio, kiu komence estis nur miriga, fariĝis teda. Sed tiufoje en Londono okazis io pli malbona, ĉar venis al li ideo, kiun li neniam estis havinta. Ĝi estis eksterordinara, timegiga ideo...

- Kiu ideo?

- La ideo, ke li iam freneziĝu. Imagu tion: eternan frenezulon. La eksciteco, kiun tiu ideo kaŭzis al li, estis tia, ke li preskaŭ freneziĝis en tiu sama momento. Tiam li ekmemoris pri io. Ĉar li havis kun si la poton kun la eliksiro, li ekpensis doni ĝin al iu virino aŭ viro, kaj ili ambaŭ fariĝos senmortaj. Unu ĉiam estos kompaniulo de la alia. Tamen, ĉar li havis multan tempon antaŭ si, li findecidis ankoraŭ nenion; li opiniis pli bone atendi la ĝustan homon. Certe estas, ke tiu ideo trankviligis lin. Se mi rakontus al vi krome la aventurojn, kiujn li spertis denove en Anglujo kaj poste en Francujo kaj en Brazilo, kien li revenis dum la vic-reĝado de la Grafo de Rezendo, mi neniam plu finus paroli, kaj cetere la tempo flugas,

krom tio, ke sinjoro kolonelo sentas dormemon...

- Kia dormemo?!

- Vi estas almenaŭ kun laceco.

- Eĉ ne kun tio, ĉar mi neniam aŭskultis ion, kiu tiel multe interesis min. Antaŭen! Rakontu tiujn kromajn aventurojn.

- Ne; mi diru nur, ke li troviĝis en Francujo okaze de la revolucio de 1789. Li atestis ĉion: la falon kaj morton de la reĝo, de la ĝirondistoj, de Danton, de Robespierre. Li loĝis kelkan tempon kun Filinto Elísio, la poeto, ĉu vi priscias? Li loĝis kun li en Parizo. Li estis unu el la membroj de la Direktorio kaj persone rilatiĝis kun la ĉefkonsulo... Li eĉ volis naturaliziĝi kaj aniĝi en la armeo kaj en la politiko; li povintus esti unu el la marŝaloj de la imperio, kaj eble eĉ ne estus okazinta la batalo apud Vaterlo. Sed tamen li tiel abomenis kelkajn tiamajn politikajn apostataĵojn, li tiel indignis, ke li rezignis tion ĝustatempe. En 1808 li troviĝis en vojaĝo kun la reĝa korteganaro⁴ al Rio-de-Ĵanejro. En 1822 li kunfestis la sendependiĝon⁵; kaj partoprenis en la konstitucianta asembleo; kunlaboris por 7-a de aprilo⁶; kunfestis la fruplenaĝiĝon⁷; tiam li estis deputito de du jaroj.

⁴ Kun Johano la Sesa, kiu transloĝiĝis al Brazilo, fuĝinte el la napoleona invado al Portugalio. N. T.

⁵ De Brazilo disde Portugalio. N. T.

⁶ Por la abdiko de Petro la Unua, en la 7-a de aprilo 1831. N. T.

⁷ La antaŭtempa plenaĝiĝo de Petro la Dua, en 1840. N. T.

Ĉe tiu ĉi punkto la du aŭskultantoj pli streĉigis la atenton. Ili ekkomprenis, ke baldaŭ ili alvenos al la fino, kaj tial ili volis malatenti neniun silabon de tiu parto de la rakonto, en kiu ili ekscios pri la morto de la senmortulo. Siaflanke D-ro Leono haltis iomete, eble pro iu dolora rememoro, sed eble ankaŭ kiel rimedon pli eksciti la scivolemon. La notario ankoraŭ demandis lin, ĉu lia patro ne donis al iu la reston de la eliksiro, laŭ volinte; sed la rakontanto respondis al li nenion. Li rigardis sin mem. Kaj jen li finis tiele:

- La animo de mia patro falis en tre profundan melankolion. Nenio ĝojigis lin; nek la gusto de la gloro, nek la gusto de la danĝero, nek tiu de la amo. Tiam li estis perdinta mian patrinon, kaj ni vivis kune, kiel du fraŭloj. La politiko perdis sian tutan allogecon antaŭ la viro, kiu pledis por sidiĝo sur trono, sur unu el la unuaj en la universo. Li estis vivanta vegete, malĝoje, senpacience, enue. En la horoj plej viglaj li faris planojn por la XX-a kaj XXIV-a jarcentoj, ĉar tiam li jam estis malkovrinta la tutan sekreton de sia vivo. Mi ne kredis al li, konfese, kaj supozis, ke temis pri mensa perturbo lia; sed tamen la pruvoj estis plenaj, kaj cetere la observoj konkludigis, ke li havis plenan sanon. Nur lia spirito, laŭ mi diris, ŝajnis malfortiĝinta kaj elreviĝinta. Iun tagon, dirinte al li, ke mi ne povas kompreni tiel grandan malgajemon, se konsideri, ke mi donus mian animon al la diablo, por havi la eternan vivon, mia patro ridetis kun tia esprimo de supereco, ke li profunde hontigis min. Poste li diris, ke mi ne scias, kion mi diras; ke la eterna vivo ŝajnas al mi bonega, ĝuste ĉar la mia estas limigita kaj

mallonga; ke la lia en vero estas la plej kruela el la turmentoj. Li vidis morti ĉiujn siajn amatajn homojn; li devos iam perdi min kaj ĉiujn ceterajn gefilojn, kiujn li naskigos jarcentojn poste. Aliaj amitaj homoj, kaj ne malmultaj, trompis lin; kaj jen kun unuj tiaj, jen kun aliaj, bonaj kaj malbonaj, sinceraj kaj perfidemaj, estis al li devige rerilatiĝi, senĉese, sen eĉ minimuma halto, tial ĉar lia spertado ne povis valori al li kontraŭ la bezono korligiĝi al iu dum tiu rapida pasado de homoj kaj generacioj. Tio estis bezono el la eterna vivo. Sen ĝi, li falus en la demencon. Li spertis ĉion, ĝisfunde uzis ĉion; nun estadis la ripetiĝemo, la monotonio, sen esperdonoj, sen io ajn nova. Li devos rediri al la aliaj gefiloj, dudek aŭ tridek jarcentojn pli poste, ĉion, kion li estis diranta al mi nun; kaj poste al aliaj, kaj aliaj, kaj aliaj... ĝis la senfino. Li devus lerni novajn lingvojn, same kiel Hanibalo, se li vivus ĝis hodiaŭ, kaj por kio? Por aŭskulti pri la samaj sentoj, la samaj pasioj... Kaj li parolis ĉion tion al mi vere malvigle. Ĉu ne ŝajnas bizare? Finfine, iun tagon, ĉar mi estis faranta al kelkaj geamikoj ekspozicion pri la homeopatia sistemo, mi vidis ekbrili en la okuloj de mia patro ian ne plu uzatan kaj eksterordinaran fajron. Li pridiris nenion al mi. En la nokto oni vokis min en lian dormoĉambron. Mi trovis lin agonianta. Tiam li diris al mi, kun malfacilo, ke la homeopatia principo estis por li savo. *Similia similibus curantur*. Li estis trinkinta la reston de la eliksiro, kaj tial, ĉar la unua duono donis al li la vivon, la dua donis al li la morton. Kaj dirinte tion, li mortis.

La kolonelo kaj la notario restis iom da tempo silentaj, ne sciante, kion pensi pri tiu mirinda historio; tamen la seriozeco de la kuracisto estis tiel profunda, ke ĝi estis nedubinda. Ili kredis pri la okazaĵo kaj kredis ankaŭ definitive pri la homeopatio. Kiam oni rakontis la historion al aliaj homoj, kelkaj sugestis, ke la kuracisto estas freneza; aliaj atribuis al li la intencon estingi el la koro de la kolonelo kaj de la notario la malĝojn sentitan de ili ambaŭ ne povi vivi eterne, elmontrante al ili, ke la morto estas, kontraŭe, bonaĵo. Tamen la suspekto, ke li nur intencis propagandi homeopation venis en kelkajn kapojn, kaj ne estis neverŝajne. Mi lasas tiun ĉi problemon al la studuloj. Tia estis la eksterordinara okazaĵo, kiun, antaŭ longaj jaroj, per alia nomo kaj per aliaj vortoj, mi rakontis al tiu ĉi bona popolo, kiu probable jam forgesis pri ambaŭ ili.